ESPERANTO

MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

# INFORMILO

1

JANUARO 2007 Kol. 261/23

**Enhavo:**
Novjara mesaĝo de la prezidantino
Interreta paĝoj de firmao
El la redakcio
La 18-a IKF en Ústí n. L.
Patroneco por diabetuloj
E-kalendaro 2007
Tri ruĝaj knabinoj

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

## Novjara mesaĝo de la prezidantino de AEH

Estimataj legantoj, karaj geamikoj,

permesu al mi saluti kaj sincere bondeziri vin okaze de eniro en la novan jaron 2007. Samtempe mi volus danki al multaj membroj, kiuj sendis al la redakcio kristnaskajn kaj novjarajn bondezirojn.



Ĉu ni volas aŭ ne volas, denove ni pli aĝas je unu jaro. Kia estis tiu forpasinta jaro? Ĉu multe aŭ malmulte ni klopodis evoluigi nian internacian lingvon kaj plibonigi ĝian pozicion inter ĝiaj kontraŭstarantoj? Ĉu ni dum la tuta jaro povis sufiĉe perfektigi niajn konojn? Ĉu ni multe faris por bona propagando de nia ŝatata lingvo? – Provu ĉiu unuope mem respondi la demandojn!

Jes, mi scias, ke la respondoj ne estus simplaj. Unu elturniĝus pro manko de la tempo, la dua pro malproksimo de la klubo, la tria pro malsaniĝo, la kvara dirus "mi estas jam tro maljuna por fari ion", la kvina "mi jam estas pensiulo kaj mi volas bone kaj trankvile eluzi la reston de la vivo". Pluaj devas gardi genepojn, aŭ pli multe lerni anglan lingvon ol Esperanton – mi opinias, ke mi trovus ankoraŭ plurajn elturniĝojn, kiujn mi legas kaj aŭdas.

Sed mi preferas sloganon: Kiu volas, tiu povas.

Tamen nia eta kolektivo de funkciuloj de AEH (el 95% pensiuloj kun sanproblemoj) devas ĝoji pro tio, ke tiuj membroj, kiuj ne povas mem partopreni E-laboron, almenaŭ de tempo al tempo skribas pri sia kontento pri nia eta gazeto, ke ili ĉiam ĝojas pro ĝia ricevo. Ili skribas, ke tie estas sufiĉe da interesaj informoj, ke la regula monata gazeto estas ilia sola kunligo kun Esperanto-mondo – (kvan-

kam ne estas tie loko por kvizoj, krucenigmoj, anekdotoj aŭ diversaj poem-
rimaĵoj de niaj novaj aŭ malnovaj talentoj).

Ni scias, ke la aĝo de niaj membroj estas alta; proksimume 25 % estas pli aĝaj
ol 80 j., tri membroj atingos nunjare 92-94 j. kaj en pensia aĝo de la 60 j. ĝis 80 j.
estas preskaŭ 50% de niaj membroj. Reston de la procentoj faras membroj en
meza aĝo. Ankaŭ 10 membroj el niaj vicoj pasintjare forpasis por ĉiam kaj tiel
estas videbla, ke fakte junularo en nia asocio mankas. Sed ni ĝojas, ke E-junularo
en Ĉeĥa E-Asocio kreskas, sanas kaj havas sian junan kolektivon, kiu bone pro-
gresas.

Mi volas reveni al la pasinta jaro, ke nur en nemultaj frazoj mi tuŝu la pasintja-
ran agadon, ja nia asocio kun 210 membroj estas nur malgranda. La jarkolekto de
regule monate eldonata gazeteto havis pasintjare numeron 22 kaj decembre estis
eldonita 260-a numero. Pri korespondaĵo de AEH zorgas unu persono, dum la
pasinta jaro venis "nur" 1079 sendaĵoj inkluzive 5 specoj de eksterlandaj gazetoj.
Forsenditaj estis unuope 782 leteroj per interreta kaj papera poŝtoj. Eldonitaj estis
E-traduko de la ĉeĥa Fabelo pri mielkuka dometo (por muzeo de marcipano), ĉeĥa
traduko de la broŝuro Vivo kaj verko de doktoro Schulhof, pli ol 400 invitiloj por
la Kvina kongreso de AEH, kaj pli ol 100 flugfolioj (pri AEH kaj Kio estas Espe-
ranto) krom regule eldonataj gazetoj Informilo kaj Antaŭen. Estis ligita kunlabo-
ro kun interreta Radio-Aktiva Urugvay, kie nia faka asocio de UEA havas senpa-
gan eblon propagandi AEH kaj ĉefe nian ĉeĥan landon. Estis realigita jam la tria
rekta sonarkiva relacio en ĝia radio-elsendo.

Sed antaŭ ni estas grava tasko – organizi jam la 5-an kongreson de AEH-IKEH.
Ĝi okazos de la 30-a de majo ĝis la 3-a de junio 2007 proksime de akvovalbaraĵo,
en la urbeto Seč – ĉe la rivero Ĥrudimka. Ni sukcesis mendi la plej malmul-
tekostan restadon en la eksa internacia junulara restadejo, kiu estas nove rekon-
struita. La oficialan programon de la kongreso kun balotado de la nova komitato
por plua 5-jara periodo ni planas nur por unu tago. La plua programo antaŭvidas
interesajn prelegojn, videofilmojn, kultur-amuzan programon kun danco kaj tom-
bolo kaj ekskursojn. La aranĝon ni volus ligi kun renkontiĝo de la XVI-a Espe-
ranto-tago kaj ankaŭ rememori, ke en tiu ĉi jaro pasos 120 jaroj de ekzisto de
Esperanto.

Pro tio ni elkore invitas ĉiujn esperantistojn — ne nur membrojn de AEH, sed
ankaŭ ceterajn, ĉiujn, kiuj interesiĝas pri niaj renkontiĝoj kaj ŝatas nian kolekti-
von. Tre volonte ni renkontus tie ankaŭ eksterlandajn esperantistojn, kiuj ankoraŭ
ne konas tiun ĉi angulon de nia lando ĉe la lago Seč. La detalan programon rice-
vos ĉiu aliĝinto.

Certe estas komprenebla, ke dum tiu ĉi printempo — nur pri kelkaj semajnoj
pli frue – nia asocio ne povas zorgi ankaŭ pri la semajna seminario en Skokovy.


# Pri la alfabeto kaj ortografio

La Akademio de Esperanto ĵus voĉdone aprobis la jenan raporton de la Sekcio pri prononcado (33 akademianoj voĉdonis jese, 5 nee kaj 1 sindetene).

Pri apartaj teknikaj bezonoj rilate al niaj alfabeto kaj ortografio:

La Akademio de Esperanto konfirmas sian pozicion, jam esprimitan en 1982, ke la ortografio de Esperanto, kiel ĝi estas prezentita en la Fundamento de Esperanto, konformas perfekte al la karaktero de la lingvo, kaj ke neniu ŝanĝo estas necesa aŭ dezirinda.

Nur kiam la cirkonstancoj ne permesas uzi la ĝustajn supersignojn, kaj kiam pro apartaj bezonoj la Fundamenta anstataŭa skribsistemo (ch, gh, hh, jh, sh, u) ne estas oportuna, oni povas anstataŭigi la supersignajn literojn per aliaj signoj aŭ signokombinoj. Tian anstataŭigon, kiam ĝi estas nura teknika rimedo, ne celanta reformon de la ortografio de Esperanto, kaj kiam ĝi neniel kaŭzas konfuzon, oni ne rigardu kiel kontraŭ-Fundamentan.




Ekzistas ankaŭ aliaj cirkonstancoj, kiam nia lingvo estas prezentata alimaniere ol per la normala skribo, ekz. en stenografio, morse, brajle, per fonetika transskribo k.s., kaj kiam teksto Esperanta estas konservata aŭ transsendata elektronike en cifereca formo laŭ diversaj kodsistemoj, kaj ankoraŭ aliaj similaj okazoj. Ankaŭ tiajn manierojn skribi, transskribi aŭ prezenti nian lingvon oni ne rigardu kiel kontraŭ-Fundamentajn.


Geraldo Mattos, prezidanto de la Akademio de Esperanto

vidu: http://googlegroups.com/group/AdE-Oficialaj-Informoj/

fonto: Ret-info http://www.eventoj.hu

# Hundo – resaniganto

Niaj ŝatataj bestoj sendube mildigas streĉon, solecon de vivo kaj riĉigas ĝin per iom da amuzo. Tio devigis scienculojn esplori, kiamaniere la hundoj povas favore efiki al homoj kun mov-problemoj, al kardiakoj kaj homoj en soleco.



Kuracado de kardiako. Karesante ŝatatan aŭ amatan beston, nia kor-pulso malrapidiĝas, malaltiĝas nia sangopremo, nia korpo kaj animo trankviliĝas. Parolante al la hundo ni certas, ke ĝi atenteme aŭskultas kaj komprenas. Oni esploris, ke bestbredisto havas ŝancon vivi pli longe, ol tiu, kiu vivas sola. Hundo ofte bezonas iri eksteren, do al la bestbredisto ne mankas mov-aktiveco. Tio bone influas sanstaton kaj animstaton de la bredisto.


Anim-resaniĝo. Doktoro Feldman proklamas: "La hundoj helpas al homoj sukcese batali kontraŭ komplikaj situacioj de la moderna vivo kaj grave influas animsanon kaj sento-staton de la bestoposedanto. La besto ebligas al la homo ami kaj samtempe ĝi reciprokas lian amon." La hundoj kapablas senlime ami sian „mastron", pro tio la malsanulo ne sentas sin endanĝerigita, li sentas nur sindonecon de sia hundo. Pli aĝaj homoj havas eksenton, ke familianoj kaj amikoj ilin jam ne bezonas tiel, kiel antaŭe. Tiun ĉi eksenton malofte havas homo, kiu posedas hundon.

Ŝajnas, ke la hundo, pursanga aŭ hibrido, bone konas bezonojn de la homo. Ĝi nur atendas etajn zorgojn kaj pli poste jam ĝi dediĉas tutan sian vivon al unusola celo: kontentigi sian amikon.

El la libro „Via neŭrotika hundo" tradukis Pavel Nechvíle

# Informoj el redakcio

1) De samarkandaj esperantistoj venis letero kun la peto informi pri ilia projekto en nia Informilo. Jen mallongigite: En aŭgusto 2007 la urbo Samarkando oficiale kaj solene festos sian 2750-jariĝon subaŭspicie de UNESKO. Por celebri la gloran jubileon de la mondfama urbo, la Internacia Muzeo de Paco kaj Solidareco kaj loka E-klubo kolektas diversspecajn kaj ĉiulingvajn materialojn por granda internacia ekspozicio (gratulleterojn, vojaĝrakontojn, gazetartikolojn, broŝurojn, poemojn, kantojn, fotojn ktp. pri Samarkando kaj pri iliaj loĝantoj; ili kolektas ĉio ajn pri la temo, inkluzive fotojn aŭ informojn pri hoteloj, vendejoj, stratoj, komunumoj, firmaoj, librotitoloj, artaĵoj...Ĉion, kio portas la nomon "Samarkand".




Ĉiuj ricevitaj kontribuaĵoj estos agnoskitaj kaj eksponataj en la internacia ekspozicio en Samarkanda Ŝtata Muzeo pri Historio de Kulturo kaj Artoj de Uzbekistano. Estas ankaŭ planate eldoni specialan jubilean libron.

Bonvolu adresi viajn kontribuaĵojn laŭeble baldaŭ al Anatoli Ionesov, Direktoro de Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro, P.O. Box 76, UZ - 140100 Samarkand, Respubliko Uzbekistano. Telefono/ fakso: +998 (66) 233 17 53.
http://www.aliaflanko.de/urbo/samarkand/muzeo.html

Anticipajn dankojn por via kunlaboro kaj afabla subteno.

2) Plua interesa letero venis de la japana Komitato de 25 virinaj organizoj de gubernio Hiroŝima, kiuj organizas komunan kunsidon okaze de Internacia Virina

tago de UN 2007 kaj petas nian kunlaboron. Ili deziras, ke niaj membroj sendu al ili niajn rememorojn je la Dua mondmilito, kiel heredigi pensojn pri niaj militaj spertoj al sekvanta generacio. La ĉeftemo de ilia solenaĵo estas "Al gefiloj trasdonu morgaŭon sen milito".
La jaro 2007 estas 60-a jaro de la Japana konstitucio. Niajn kontribuaĵojn ili atendas nur rete kiel teksto sur formato A4 ĝis la 25-a de februaro, la mesaĝon kompletu per via nomo, aĝo, sekso, profesio kaj loĝloko. Ĉiujn respondojn ili printos kaj prezentos dum la solena kunsido. Sendu Viajn kontribuojn al s-ino Osioka Taeko, rete:osioka@mail.goo.ne.jp . Unu mesaĝon promesis S. Š. el Kladno. Kiu ankaŭ skribos al ili?

3) Venis dankletero de svisa Muzeo de fotoaparatoj el la urbo Vevey pro la traduko de ilia prospekto en la ĉeĥan lingvon. Merite de Esperanto havas la eventualaj ĉeĥaj vizitantoj dum la trarigardo de la muzeo ankaŭ ĉeĥan tekston danke al nia membro Karel Votoček, kunlabore kun Jan Werner, Václav Stibůrek kaj Karel Kraft.

4) La komitato de AEH preparis balotbileton por la nova komitato, okazonta dum la V-a kongreso de AEH-IKEH en urbeto Seč ĉe la granda lago. Ni petas ĉiujn membrojn, ke ili tralegu la kandidatojn kaj laŭ la regulo bonvolu plenumi la balotbileton. Tiuj, kiuj ne povos persone baloti dum la kongreso, bonvolu sendi la balotbileton al nia redakcio; la koverton signu per slogano **V. sjezd – volby.** Ankaŭ ni petas eksterlandanojn, kiuj ne povos persone partopreni, sendi la koverton kun la surskribo **V-a kongreso – balotoj**. La kovertoj sendotaj per la poŝto estu surloke plej malfrue la 27. 5. 2007.

5) Trista informo venis de nia ŝatata amikino, tradukistino, senĉese aktiva esperantistino, Jana Cíchová – Hrdličková el Černovice. Ŝia edzo s-ro Jaroslav Hrdlička forpasis post longa malsano en siaj 88j. lastan tagon de pasinta jaro. La redakcio kondolencis.

jary


## Invito:

Esperanto-rondeto en Litomyšl invitas vin al E-ekspozicio okaze de signifa jubileo de Esperanto. Ĝi okazos en Urba biblioteko de 19. 3. – 31. 3. 2007, ĝi troviĝas sur la placo ĉe la urbdomo. La prelego pri Esperanto tie estos preparita por mardo la 20-a de marto de la 17-a horo.

L.Dvořáková

# Legomo por cerbo

Laŭ spertoj de usonaj doktoroj nutraĵ-specialistoj, la manĝado de legomo malhelpas maljuniĝadon de la cerbo.



Esplorgrupo de profesorino doktorino Martha Clare Morris de ĉikaga univerzitato anoncis konkludon de sia sesjara esplorado en faka gazeto „Neŭrologio“. Oni esploris en la jaro 1946 sesdekkvinjarulojn. Tiuj, kiuj ĉiutage manĝis du porciojn da legomo, havis cerban kapablon de sesdekjaruloj. Tiajn eksterordinarajn efikojn havas folia legomo, ekzemple ĉina brasiko, ĉar ĝi enhavas multe da vitamino E, kiu neŭtralizas liberajn radikalojn, kiuj detruas la ĉelojn. Oni rekomendas konzumadon de legomo en formo de salatoj kun oleo. Tio subtenas ensorbadon de la vitamino. La fruktoj ne havas tian efikon, kiel folia legomo.

El la pola gazeto „Fakty i mity“ esperantigis Vlado Sládeček

**Moto: „ La lingva anguleto en INFORMILO ne tiom pli alloge“.**

## „Melanezia Esperanto"

Karaj gelegantoj,

dum mia studado de akuzativo mi trovis interesajn informojn, kiujn mi volas sciigi al vi. La franca aŭtoro Daniel MOIRAND, sciante, kiel esperantistoj senĉese batalas kun tiu ĉi „diabla fenomeno“, intencis proksimigi ĝin al ni. Sian libroforman eseon li nomis ĝuste AKUZATIVO. Kredu, ke tio estas preskaŭ „detektiva romano, en kiu la leganto ĉeestas iom-post-ioman malkovron de „preskaŭ nekonata lingva(j) fenomeno(j).“ (Rim.: per la difino helpis min PIV, sed kun ioma modifo).

Jen vi mem prijuĝu, ĉu estas malinterese legi en ĝi la artikoleton, kiu troviĝas sub la titolo:

### Iom da lingva komparo

Antaŭ ol aliri la problemon de akuzativo en Esperanto... mi proponas klarigon pri la iom paralela situacio de la novgvinea pisina lingvo. (**Pisino** – laŭ la formo de la vorto en la lingvo mem: **piĝino** – surbaze de la angla lingvo. Tiun ĉi lastan formon uzas R. Šulco. Ambaŭ nomoj estas pravigeblaj, sed **piĝino** rilatas al ĉiaspeca piginiĝinta lingvo – franca piĝino, portugala piĝino... – dum **pisino** rilatas nur al la angla piĝino parolata sur parto de la Novgvinea insulo).

Temas pri la tute nova lingvo, kiu spontanece kreiĝis antaŭ iom pli ol unu jarcento (do ĝi havas proksimume la saman aĝon kiel Esperanto), en Queensland (nordorienta parto de Aŭstralio). Ĝi elŝprucis el la ĉiutaga vivo sub la premo de la komunika neceso inter diverslingvaj gentoj. Multaj etnoj laboris en la kanaj plantejoj de norda Aŭstralio: angloj, diverstribaj aŭstraliaj aborigenoj, papuoj, malsimildevenaj melanezianoj, polinezianoj...

►30.5.-3.6.2007:La 5-a internacia kongreso de AEH-IKEH (Asocio de Esperantistoj-Handikapuloj) kune kun 16-a Esperanto-tago en moderna senbariera konstruaĵo Juniorcentro Seč. Inf.: aeh-ikeh@volny.cz

► Esperantistoj de Pilzena klubo elkore invitas vin al la 6-a turisma renkontiĝo en PLASY (TREP), kiu okazos de la 14-a ĝis la 17-a de junio 2007. La prezo por 1 tago por anoj de AEH kaj ĈEA 300 Kč, por eksterlandanoj 20 €. Aliĝojn kun preciza adreso, naskiĝdato kaj tempo de alveno bonvolu sendi ĝis fino de la majo, aŭ letere al **Václav Kaprál, P.O.Box 11, CZ 33151 Kazňejov**, aŭ rete esperantoplzen@centrum.cz

► 30.6.-6.7.2007: EKOTUR 2007, Ekoturisma renkontiĝo por piedirantoj kaj biciklantoj. Radošov apud Karlovy Vary, unutaga vizito de Internacia Filmfestivalo tie. Info: chrdle@kava-pech.cz

► 30.6.-14.7.2007: La unua etapo de Esperanto-Tendaro en Lanĉov apud Vranovská přehrada. Kursoj de Esperanto kaj aliaj fremdaj lingvoj.

►15.-28.7. 2007: La dua etapo de Esperanto-Tendaro en Lanĉov.
Inf.: podhradska@volny.cz

►21.-28.7.2007: Komuna busvojaĝo el Olomouc al la 18-a Ekumena Kongreso en Pelplin (PL) (60-a IKUE, 57-a KELI) kune kun la 8-a Junulara Ekumena Esperanto-Tendaro. Inf.: m.svacek@seznam.cz

►25.7.-12.8.2007: 17-taga flugkaravano al Japanio kun partopreno de la 92-a Universala Kongreso de Esperanto en Jokohamo.
Inf.: http://www.kava-pech.cz/uk-jokohamo aŭ chrdle@kava-pech.cz

►29.7.-3.8.2007: Familia ripozado + Seminario en Lančov.
Inf: podhradska@volny.cz

►4.8.2007: Solena renkontiĝo de eksaj tendaranoj kaj amikoj okaze de la 55-a Esperanto-tendaro. Inf.: podhradska@volny.cz

-- -- --

**En webaj paĝoj de AEH** " www.volny.cz/aeh-ikeh " estas kompletigitaj ĉiuj numeroj de Informilo kaj Antaŭen ĝis la fino de pasinta jaro(de 1/2002 – 12/2006). Estis multaj problemoj kaj tiel ekestis granda malfruiĝo.

***Starto* en la reto**

La oficiala organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio estas atingebla ankaŭ rete. Antaŭ la malfermo konsideru la grandecon 2.5 MB.
http://www.medy.cz/Brno-Esperanto/start.pdf

*Lingva anguleto:*

## Tri ruĝaj knabinoj

La publikigo de „lingva anguleto“ pri la difina artikolo „la“ en la 12-a n-ro de „Informilo“ (2006) estis por mi iom surpriza, ĉar mi la tekston ne sendis por tiu

celo. Tamen mi konsideras la publikigon utila, en ĉeĥaj esperantlingvaj eldonaĵoj ja abundas erara neglektado de la artikolo, jes, ankaŭ en „Informilo“ de AEH, en „Starto“ de ĈEA, sur pluraj bildkartoj pri urboj kun la surskribo „Saluton el urbo X“ (anstataŭ „el **la** urbo X) kaj aliloke.

Zamenhof estis edukita en la rusa lingvo, kiu la difinan artikolon ne enhavas, same kiel la ĉeĥa. Li supozeble ne sentis ties bezonon, kiel ni. Kaj tamen li enkondukis ĝin. Pri evento, kiu lin konvinkis, ke la artikolo estas bezonata, li foje rakontis al Marie Hankel kaj tiu poste transdonis ĝin plu, ankaŭ al G. Waringhien.

La afero de difina artikolo estis por Zamenhof laŭdire turmenta, ĉar en gimnazio li konatiĝis kun la problemo de artikoloj studante okcidenteŭropajn lingvojn. Sed edukita en la rusa, li ne sciis decidi, kiel la aferon solvi en lingvo internacia, kiun li tiam kompiladis. Ĝis foja nokta sonĝo.

Li sonĝis pri kamparo kaj kamparanoj, kiuj parolis pri iu grava malfeliĉo en la okazo, se el arbaro videbla en malproksimo eliros tri ruĝaj knabinoj. La homoj timeme observadis la arbaron. Subite unu el ili ekkriis (verŝajne en la lingvo internacia, pri kiu li okupiĝis): „Jen **la** tri ruĝaj knabinoj!“ Zamenhof vekiĝis, jam tute certa, ke la artikolo estas ne nur utila, sed necesa. Vere, la krio „Jen tri ruĝaj knabinoj!“, sen artikolo, estus nur indiferenta konstato, ne la emocia elkrio, reflektanta timon pro la antaŭvidata venonta plago.

Estas bezone, ke ni profunde konsciiĝu pri la diferenco inter certa eldiraĵo sen aŭ kun la artikolo, la diferencon ni provu enmeti en nian subkonscion, por ke nia lingvostilo estu nature internacia, ne ĉeĥa.

*Jan Werner*

La redakcio estis informita pri forpaso de nia membrino Kristyna Babian el Gdansk Pollando komence de la nova jaro. Precizan daton dume ni ne scias.

-----

Unuopajn artikolojn kontrollegis: J. Werner, J. Krob, S. Štefan, K. Votoček, P. Petrik

**INFORMILO** – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj
Redaktoroj: M. Filip, J. Kosnar, J. Rýznarová, L. Srbová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **466 611 941**
e-mail: **aeh-ikeh@volny.cz** interreto: **www.volny.cz/aeh-ikeh**
Bankovní spojení: Poštovní spořitelna, číslo účtu AEH **192150088**, kód banky **0300**
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (nad vaší adresou) jako variabilní symbol!
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj